

Esperanto en servo de la monda paco



PAKO

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



T. Evgeniev
Abundo

5
80

Ekzistas aferoj kaj faroj, kiujn oni ĉe tiam taksas, kiam ili mankas. La paco estas alia stato, ni opinias la pacon kara trezoro, ankaŭ tiam, kiam ni vivas en ĝi. La sorto de la paco nek unu minuton lasas nin apatiaj, rilate al tiu afero ni neniam sentas indiferentecon. Mi sentis tiujn pensojn sonori el la animstatoj kaj vortoj de la ĉeestantoj de la Budapeŝta estrarkunsido de Monda Packonsilio.

En monato majo inter la 8—12-a konferencis la estraro de Monda Packonsilio en la Budapeŝta Parlamentejo. Partoprenis en la konferenco preskaŭ 266 deputitoj kaj 12 internaciaj organizoj. Inter la delegitoj ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado.

En la prezidantaro de la solena malfermo la gastigantan hungaran popolon reprezentis eminentaj hungaraj ŝtataj, publikvivaj kaj pacmovadaj gvidantoj. Ĉeestis en la prezidantaro ankaŭ eminentuloj de la internacia pacmovado sub la gvido de la prezidanto de Monda Packonsilio Romesh Chandra.

En la nomo de hungara pacmovado, la prezidanto de Hungara Packonsilio sino Nándor Sebastyén salutis la ĉeestantojn. En la malferma parolado ŝi akcentis, ke grandsignifa estas por la homaro la paco kaj precipe nuntempe tre grava estas la mobilizado de ĉiu homo por la tenado de la paco, bezonata estas la kunlaboro de popoloj, nacioj kaj progresemaj homoj, kiuj ĝis nun helpis la subtenadon de la paco.

La partoprenintoj de la konferenco per unuminita muta staro omaĝis la memoron de la mortinta Josip Broz Tito, la granda filo de Jugoslavio.

La partoprenintoj de la konferenco kun granda plaĉo akceptis la saluton de la unua sekretario de Hungara Socialista Laborista Partio János Kádár, kiu akcentis en la adresita mesaĝo, ke la monda pacmovado, kiu esprimas la volon de centmilionoj da homoj kaj kiu estas ĉiam pli efika formilo de la mondpublika opinio, reprezentas grandegan forton. Pere de la kunlaboro kaj aktiva kondutmaniero de progresemaj, pacemaj fortoj estas ebla la defendo de la ĝisnunaj akiraĵoj de la mondmildiĝo, deflankigo de nova armada ondo kaj de minaco de nova mondmilito.

En la nomo de la hungara registraro István Huszár — vicĉefministro, salutis la konferencon kaj akcentis, ke la partoprenantoj de la konferenco faras idean interŝanĝon pri tiaj demandoj, pli gravaj ol kiuj nuntempe ne estas en la mondo. La ĉeestantoj debatis la eblecojn kaj tialojn firmigi la mildiĝon, la interrilatojn de la paco kaj la disvolviĝo, diskutis kiamaniere la progresemaj fortoj de la mondo konduki en intereso de la redukto de la streĉa situacio, kiamaniere oni agu por la malarmado kaj la paco. Li deklaris, ke la registaro kaj la ŝtataroj de Hungara Popolrespubliko volas vivi en paco kaj ili kune agadas por la politiko de paco kunezistado.

La prezidanto de Monda Packonsilio Romesh Chandra, akcentis dum sia parolado kaj en la alparoloj, ke signifoplena evento estas en la tri-

ESTRARKUNSIDO DE MONDA PACKONSILIO

jardeka ekzisto de internacia pacmovado la budapeŝta konferenco, kiu okazas tiam, kiam en diversaj lokoj de la mondo oni provas malvarmigi la politikan medion de plua mildiĝo per frostiga vento de iu nova malvarma milito. Antaŭ kvin jaroj en Helsinko trankvilaj politikistoj malfermis la perspektivojn de daŭra paco per la tiama interkonsento, kaj nun ni devas levii nian voĉon kontraŭ homoj, kiuj estas pretaj eksplodigi novan militon. Resuminte la celon kaj farataĵojn de la budapeŝta forumo, tiu kolektivo vokas la fidelulojn de la paco batali. Li emfazis, ke la naciaj pacmovadaj organoj ekzistantaj en ĉiuj landoj devas krei unuecan fronton kaj devas fortieni tiujn manojn, kiuj tenas la armilojn.

Dum la interkonsultado konataj pacbatalantoj el diversaj partoj de la mondo — sen konsidero de politikaj kaj religiaj vidpunktoj — povis komprenigi siajn opiniojn kaj ili ĉiuj emfazis, ke ĉiuj estas unuanimaj en tio, ke oni devas fari ĉion por la subtenado de la paco, per la firmigo de plua mildiĝo. Ni devas plenumi nian ĵuron, kiun ni faris sur la ruinoj de urboj kaj vilaĝoj kaj apud la homaj tomboj, ke ni ne permesos la eksplodon de nova milito. Tial ni persiste luktas por la paco, ni plifortigos nian batalon kontraŭ la internacia imperiismo.

La partoprenintoj en la konferenco okupiĝis pri la demandoj de la eŭropa paco kaj sekureco, pri la medioprotektado kaj pri la ĉefaj pacpolitikaj demandoj de nia epoko. En intereso de plua firmigo de mildiĝo, por koreservo de la paco la partoprenintoj akceptis diversajn dokumentojn kaj eldonis alvokojn. Oni intertraktis la preparon de „Parlamento de la Popoloj por Paco“, kiu okazos dum septembro ĉi-jare en Sofio, kaj ankaŭ oni estigis preparan kaj organizan komitatojn de la Sofia aranĝaĵo, kiu konsidere al la grava temo ekscitas monddimensian interesiĝon — kun kiu samtempe kaj samloke ni aranĝas esperantistan pacrenkonton — tiu pacparlamento servos tiun celon, ke la reprezentantoj de la mondpublika opinio povas komprenigi siajn pensojn kaj imagojn pri la stato kaj en ankoraŭ pli larĝa forumo povu sonigi la devizon: „Ni alvokas ĉiun homon por defendo de la paco!“

Kun la partopreno de miloj da budapeŝtanoj okazis ankaŭ entuziasma ĝenerala grandkunsido kie István Sarlós, ĉefsekretario de la Hungara Patriota Popolfronto en solena parolado taksis ►

eduki la infanojn por paco

Rosa Griso

En la kadro de la Internacia Jaro de Infano ĉie tra la mondo ŝprucis iniciatoj, tiel de ŝtatoj, kiel de ne-registaraj organizoj favore al infanaj rajtoj, kiuj estis unuanime aprobitaj de la Ĝenerala Asembleo de UNO antaŭ dudek jaroj.

Unu el tiuj rajtoj temas pri la eduko por paco. La deka principo de la Deklaracio pri Infanaj Rajtoj tekstas: „Necesas, ke infano estu protektata kontraŭ praktikado povanta estigi rasan, religian aŭ ian ajn diskriminacion. Infano estu instruata tiel, ke oni inspiru al ĝi komprenon, toleremon, amikecon inter la popoloj, universalan pacon kaj fratecon, kune kun la plenkonscio dediĉi siajn energion kaj kapablojn serve al la aliaj.“

Se oni analizos vorton post vorto tiun principon kaj se oni komparos la realon, kiun al ni ofertas la hodiaŭa mondo, ni demandos nin, kiel ni edukos niajn infanojn cele al la paco, dum ni vivadas ĉirkaŭitaj de ĉiuspecaj perfortaĵoj.

Eduki cele al la paco estas malfacila tasko, ĉar ĝi postulas anticipanaligon de la edukistoj mem. Tiuj ĉi devos kompreni kaj asimili la realan kaj plej ampleksan sencon de tio, kion signifas paco, de ĉio, kio estas paco disde tio kio ne estas paco, la kondiĉojn de ĝia ekzistado kaj la obstaklojn por ĝia stabiligo.

la signifon de la paco kaj la gravecon de la venko super la faŝismo. Romesh Chandra resumis la ĝisnunajn rezultojn de la pacmovado, determinis la plej gravajn taskojn por la sekvonta periodo, parolis digne pri la sukcesplena laboro de tiuj homoj, kiuj konstante laboras por la paco, kun entuziasmaj vortoj li vokis unuiĝi la homojn kunbatalantajn al la vojo de paco. Poste li solene transdonis honorigan laŭdon al la reprezentantoj de Budapeŝto. Tio estas granda honorigo por la loĝantoj de la ĉefurbo kaj por la tuta hungara popolo.

La akceptita rezolucio vokas la homojn por defendo de la paco; tiu voko koncernas al ĉiuj, ĝi alvokas ĉiujn homojn batali por la paco, invitas ĉiujn aliĝi al la tendaro de la pacfortoj. La rezolucio akcentas, ke la kreo de sereniĝo dependas de ni ĉiuj, ni flankenmetu nun ĉion, kio disigas nin, kaj ni serĉu ĉion, kio kunligas ĉiun kunlabori, por ke ni povu haltigi la militon.

La edukontoj devos serioze pripensi sian respondecon. Ili devas strebi tra sia persona kaj kolektiva atestado, transdoni al infanoj tiujn ĉi valoraĵojn.

Tio estas la personoj de bona volo: politikistoj, pensuloj, verkistoj, artistoj, instruistoj, gepatroj ktp., kiuj devos honeste klarigi la veran sencon de la paco. Diri honeste, kial la historio de nia tempo estas plena de grandaj deklarioj favore al paco, dum la realo montras al ni la mondon pli kaj pli malsolidara, pli egoisma, pli maltrankviliga.

La edukontoj pri paco povas ja esti multenombraj; ne sufiĉas nur konsciiĝi pri ties respondeco kaj ebloj respektive al ĉiu el ni. Necesas konstrui tiun ĉi pacon spanon post spano, en la hejmoj, surstrate, en laborejoj, en lernejoj, en parlamentejoj, en internaciaj organizoj. . . Sincere konvinkitaj, neignorante la dramon de la perfortaĵoj, nepras malfermi niajn korojn al vera sopiro pri paco.

Por konduki la popolojn al paco, ni devas ekde nun streĉe prepari malsimilajn generaciojn ol la niaj. Necesas lernigi al la infanoj ami, ke ili faru el la socio komunumon pli justan kaj honestan. Tion ni tamen atingos nur se ni kapablas prezenti mondon pli humanecan kaj pli solidaran. Nur per la ekzistado de kohereco inter niaj diroj kaj niaj agoj, ni komencos meti la fundamenton por atingi pacon en la mondo.

La infanoj estas la plej vundebla parto de socio antaŭ la perforto, sed ili ja estas nia espero por pli bona morgaŭo.

La agado por la paco fariĝos fruktodona tuj kiam nia laboro estos korsincere plenumita. Nur se ni komprenas la veran signifon de la paco, ni kapablos ĝin transformi en ion pli ol utopio, en ion pli ol revo ideala, sed nerealigebla.

Kun permeso de la hispana medicina revuo „Jano y Humanidades“ kaj de la aŭtorino, tradukis: FOG

Laŭ mia opinio ni, esperantistoj, tute konsentas kun la pacaj celoj, ni adoptas la rezolucion kaj kun nerompebla entuziasmo, kun pli granda volo luktadas por la konkretigo de la noblaj celoj. Ni konfesas, ke la historio, kiel granda majstro de la instruado igas nin malami la militon kaj ami la pacon. Nian fidelecon rilate al la paco nutras niaj fundamentaj interesoj, kaj ni laŭ tio agadas. En la nuntempa konfuza internacia situacio ni citas tiun ĵuron, kiun ni faris antaŭ 35 jaroj: „Neniam plu milito.“ Kaj ni tion tenas kiel nian taskon: por ke efektiviĝu la principo de paco kunekzistado, ni subtenu la pacon, la pacan sereniĝon kaj ni evoluigu la amikecon kun ĉiuj homoj, kiuj volas la pacon.

D-ro Imre Pethes
prezidanto de MEM

nuklea energio

Ekskunlaboranto de la granda franca sciencisto Frederic Joliot-Curie (Frederik Joljo Kjurri) kaj nuna prezidanto de la Konsilio de la internacia Agentejo de Nuklea Energio, Bertrand Goldschmidt (Goldŝmit) ĵus publikigis tre instruan libron: „Le complexe atomique“, en kiu li rakontas tag-post-tage la politikan historion de la nuklea energio, unue milita, poste civila.

„Kompreneble, dediĉinte mian karieron al la nuklea energio, de la Curie-laboratorio ĝis nun, mi estas favora al nuklea energio.“

Tiu kredokonfeso, senpere prononcita, ĉeestas dekomence ĝisfine de la 493 paĝoj de la libro de Bertrand Goldschmidt.

— En la politika historio de la civila atomenergio, vi startigas la kontestan movadon en Usono kaj strange en la usona trusto de karbo.

„Pri tio, nenia dubo. Ni komencis per kontraŭkontesto. Estis eksterordinara eŭforio al nuklea energio. La bordanoj de la baraĵo de Tignes uzis atomenergion kiel argumenton kontraŭ la baraĵo. Estis necese, ke Joliot parolu per radio por klarigi, ke la nuklea energio ne estis preta. Same okazis en Svedio, dum la sesdekaj jaroj, kie tiu energio mobilizis la homojn kontraŭ la grandaj hidraŭlikaj konstruaĵoj.“

„La kontestado efektive eliris el la konsorcio de la usonaj karboproduktantoj, furicaj pro la subvencioj pagataj al la atomenergio, potenciala konkurencanto; ili estis la unuaj, kiuj minacis per la spektro de katastrofo. Katastrofo? Kiel scienculo, mi ne povas diri al vi, ke tio, kio neniam okazis, ne okazos. Ĉio estas aranĝita por ke ĝi ne povu okazi. Ne estas alia industria fako tiom antaŭzorga. Sescent nukleaj centraloj funkcias en la mondo. Neniu morto okazis.“

Ankaŭ tio estas la progreso: aperas nova formo de energio, ĝi estas ne nur pli potenca, sed ankaŭ malpli polucia kaj pli sekura. Mi ĵus legis artikolon de profesoro Jacquemet en „la revue d'histoire moderne et contemporaine“ (revuo de moderna kaj nuntempa historio) en kiu li rakontas pri la kondiĉoj de konstruado de ĝiskloaka tubaro je la 1980-aj jaroj. Estis tre malfacila laboro, ĉar la ĝiskloaka tubaro renkontis la kontraŭon de bordanoj, kiuj timis la epidemiojn (dum fakte, tio estis eksterordinara progreso por ilin kontraŭbatali) kaj la kontraŭon de la fekojpurigistoj. Ankaŭ tie, tio estis neado de la progreso, kiam per ni tio evidentiĝis.“

„Imagu, ke la mondo ekkonis la petrolon ne per benzino sed per napalmo. . . Kaj kelkajn jarojn poste, oni volus konstrui grandajn rezervujojn por hidrokarbidoj. Estas kontraŭdiro.“

Vidu Plogoff: homoj ĉeestas la nigran tajdon el „Amoco Cadix“ (Amoko Kadiks), poste tiun el Tanio, kaj freŝdate okazis la akcidento de tiu platformo en la Norda Maro. Tiam ili pensas, ke sama afero povas okazi pro atomenergio. Nu estas ekzakte la malo. Tio sendependigus ilin de la petrolverdistoj. En nuklea energio, oni multe pli atentis ol en aliaj fakoj. Ankaŭ pro la trudado de la publika opinio. . .“

„Tio kio ŝajnas al mi eksterordinara, konfesas Bertrand Goldschmidt, estas, ke la kontesto tiel malmulte celas la armilaron. Estas 40 tunoj da eksplodaĵoj por ĉiu loĝanto de la mondo. Tamen francoj estis la unuaj, kiuj pensis pri civila utiligo de la atomenergio: Joliot, Halban kaj Kowarski. Tial Francio sin turnis en 1940 al la atoma motoro kaj ne al la bombo.“

— Oni multe parolis pri la de atoma terorismo. . .

„Sed neniuj pensas pri la eblo ŝteli unu el la 12 000 bomboj dislokitaj ĉirkaŭ la limo inter la du Germanioj. Mi montras en mia libro, ke ne eblas manfari atombombon per ŝtelitaj radioaktivaĵoj, kaj tio ne estas dezirinda eĉ por la ŝtelistoj mem. . .“

— Oni ofte prezentas kiel pasivon de la nuklea energio la problemon pri radioaktivaj forĵetaĵoj. Kion vi diras pri tio?

„Tio vere estas netaŭga problemo. La homoj, kiuj maltrankviliĝas pri tio, parolas pri jarmiloj. Nu, la forĵetaĵoj de centralo, post tri aŭ kvar jarcentoj, havas la saman radioaktivecon kiel la minaĵo, el kiu oni eltiris uranion. La uraniaj minaĵoj lokiĝas ie ajn en la naturo, ne speciale en la lokoj kie ne estas akvo aŭ tertremoj. En decembro mi iris en Egiptio kaj vizitis la Valon de la Reĝoj. Estas emocie vidi kiel la granito kaj dezerto konservis delikatajn pentraĵojn. Do, oni povas diri ke en granito kaj en dezerta lando, oni povus stoki tute trankvile la forĵetaĵojn.“

— Nuntempe, kion oni faras pri ili?

„Oni miksas la fisiaĵojn kun vitro, kaj oni gisas tion en ŝtalajn ujojn, laŭ tre malgranda volumeno. Tiamaniere, ili povus eterne konserviĝi. Tio tute ne estas teknika problemo, sed ekonomia problemo. Ni ne tro rapidas gisi ilin en la vitron, unue ĉar ni esperas trovi bonan solvon, kaj poste ĉar oni nin demandas ĉu ne eblos eltiri aliajn utilajn produktojn el tiuj forĵetaĵoj.“

*Intervjuo de Jean-Jacques Valignat
(El „L'Humanite-Dimanche“ — Parizo)*

Glosoj

Fisio — nuklea fendiĝo

Polucio — malpurigo de la biomedio

Tignes (prononcu Tinj) — riverbaraĵo en Francio

LA UNUA AKTO PRI PACA KUNEKZISTADO

La strebo konservi konstantan pacon inter la popoloj, kio estas unu el la fundamentaj kondiĉoj por feliĉa estonteco de la homaro, okupas unuan lokon en la monda progresema politiko, sed ĝiaj radikoj kuŝas en la profunda pasinteco. En la daŭro de la tempo ĝi ĉiam denove altiris la atenton de ŝtatestroj, pensuloj, pedagogoj kaj juristoj. Ekzemple la granda ĉeĥa pensulo-humanisto kaj pedagogo Jan Amos Komenski (1592—1670) esprimis la esencon de la paca politiko per jenaj vortoj: „La finiĝo, alivorte la celo de tiu politiko estos la solidareco kaj unueco de la popoloj de la tuta mondo, rezulto de kio estos forigo de la militoj kaj elradikigo de iliaj kaŭzoj. Ĝis nun estis tempo por disputoj, nun venos la tempo de la paco.“

La historio konas vicon da planoj kaj proponoj pri paca kunekzistado de la tuta mondo. Konsiderindan lokon inter ili okupas la projekto pri internacia organizo por la konservo de la paco, ellaborita antaŭ pli ol 500 jaroj laŭ ordono de la ĉeĥa reĝo Georgo de Poděbradi (1420—1471), konata kiel reĝo de la husanoj. Ĝi estas zorge ellaborita projekto pri internacia kontrakto, kies celo estas savi la homaron kontraŭ la minaco de militoj. Ĝi estis la unua propono pri la solvo de la problemo pri la paca kunekzistado, oficiale sendita. Por ĝia efektiviĝo okazis diplomata traktado inter la eŭropaj ŝtatoj.

La projekto estas verkita en latina lingvo kaj ĝia titolo estas „Tractatus pacis toti christianitati fiendae“ (Kontrakto pri Estigo de Paco en la Tuta Kristana Mondo). Oficiala kopio de tiu dokumento konserviĝas ĝis nun en la pola reĝa kancelario en Varsovio, kien ĝi trafis en la tempo de la anticipaj intertraktoj de la praga reĝa kortego kun la pola reĝo Kazimir kaj la hungara reĝo Matiaŝ.

La internacian politikan situacion en Eŭropo en la tempo, kiam la projekto estis verkita (1462—1464), karakterizis tri faktoroj: la ofensivo de turkoj en la Balkana Duoninsulo, la malkresko de la potenco kaj la aŭtoritato de la romia imperiestro kaj la romia papo kaj la kresko de diversaj naciaj movadoj, celantaj atingon de ekleziaj reformoj kaj de novaj rilatoj inter homoj kaj ŝtatoj. Ĉiam pli argumentita fariĝis la ideo, ke la paco povas esti savita pere de ĝenerala organizo surbaze de egalrajteco inter monarkoj kaj ŝtatoj, kiuj libervole unuiĝos en internacian komunajon de nova tipo, garantiantan al la homaro sekurecon kaj pacon. Ĝuste tiu ĉi ideo kaj

la ideo pri ebleco de paca kunekzistado inter du ŝtataroj, tiutempe la kristana kaj la islama mondoj, estas la ĉefaj ideoj de la projekto de reĝo Georgo.

La projekto konsistas el preambulo kaj artikoloj, brile formulitaj el jura vidpunkto.

Unuan fojon en politikaj kaj juraj formuloj aperas la problemoj de reciprokaj rilatoj inter suverenaj ŝtatoj, la demandoj de supera kaj komuna organizo kaj aŭtoritato, la problemoj de juraj kaj sociaj garantioj por daŭra paco. Impresas antaŭ ĉio la nova aranĝo de la mondo sur novaj principoj.

Por certigi kaj praktike realigi la novajn principojn de internacia paca kunekzistado, la projekto antaŭvidas establön de organo, „congregatio“, kiun oni interpretas kiel konstantan ĝeneralan asembleon de delegitoj de la membroŝtatoj; ĝi devis kunsidi sinsekve dum kvinjaraj periodoj en interkonsentitaj urboj de la membroŝtatoj. En tiu ĉi organo ĉiu ŝtato devis havi rajton pri unu voĉo, kaj la aprobo de la decidoj devis okazi laŭ la principo de plimulto de la voĉoj. Interna establaĵo de tiu ĉi organo laŭ la projekto devis fariĝi korpo de oficistoj, reprezentantoj de la koncernaj organizoj, t. e. sekretariato laŭ la nuntempa terminologio. Ĝin devis esti „sindicus“ (sindiko), okupanta apartan pozicion en la organizo.

Enkadre de la komuna monda organizo reĝo Georgo proponas, ke oni kreu permanentan internacian tribunalon. Tiu ĉi establaĵo devis fariĝi bazo de la estonta universala jura kodo, observenda en la tuta mondo.

La unua „akto pri paca kunekzistado“, kompreneble, ne preterlasas ankaŭ la demandon pri financado de la organizo per regulaj jaraj membrokotizoj kaj per diversaj aliaj kotizoj, kiuj unue devis esti postulataj el la eklezio.

En sia propono pri nova organizo de la mondo Georgo rezignis la ideojn de la universala mezepoka imperio, ĉe kies kapo staris la romia papo kiel reprezentanto de la spirita aŭtoritato kaj la imperiestro kiel ĉefo de la laika potenco. Li faris tion sub la influo de la ĝeneralaj streboj al reformado de la kristana socio, en kiu manifestiĝis vico da grandaj mankoj. Bazo de la internacia politika vivo en la projekto de reĝo Georgo estis la apartaj sendependaj egalrajtaj ŝtatoj, kio respondas al la nuntempa ĝenerale rekonita koncepto.

La rezultoj de tiu ĉi paca iniciato, kiu konsiderinde antaŭis sian tempon, estas bone konataj. La misio de la senditoj de la ĉeĥa, la pola kaj la hungara monarĥoj elveturis el Prago je la 16-a de majo 1464 al la franca reĝo Ludoviko la Xla kaj en la fino de junio kaj la komenco de julio intertraktis kun li kaj la reprezentantoj de la reĝa konsilantaro. Tio estis la lasta etapo de la dujaraj diplomaciaj intertraktoj, kiuj okazis ne nur en Prago, Krakovo kaj Budapeŝto, sed ankaŭ en Venecio, Bruselo kaj aliaj eŭropaj ĉefurboj. La misio proponis al la franca reĝo, ke estu

ĈSSR

De la 13-a ĝis la 15-a de junio 1980 en urbeto Merklin (distr. Karlovy Vary) — ĈSSR okazis III-a Internacia Renkontiĝo de ercmontraraj esperantistoj. Ĝi estis dediĉita al paclaboro de esperantistoj el 4 landoj — ĈSSR, USSR, Polio kaj GDR. Estis akceptita jena

Rezolucio

Ni, partoprenantoj el kvar nacioj suferintaj de la plej terura milito en la historio de la homaro, deklaras, ke nia plej alta valoro kaj espero estas la mondpaĉo.

Ni kunvenis sur la samaj lokoj, kie jam antaŭ pli ol kvardek jaroj niaj patroj manifestis la internacian solidarecon de la proletoj kontraŭ minacanta faŝismo. Same kiel tiam kunigas nin ne nur la internacia lingvo Esperanto, sed ankaŭ la strebado por konservi la pacon.

Ĉirkaŭe ni vidas verdajn herbejojn kaj arbarojn, bonodorantajn florojn kaj brilantan sunon: ni volas, ke ĉio ĉi restu konservita por ĉiuj popoloj de la mondo — ke nenie kaj neniam sur neniun kontinento estu la militoj.

Ni scias, ke same kiel guto al guto finfine kreas maron — eĉ eta amikeco de la unuopuloj povas krei grandan kaj senfinan ĉenon de la amikoj en la tutmondo. Tial ni volas daŭrigi la strebon por konservi la mondpacon, disvastigi la internacian lingvon Esperanto en ĉiuj vicoj de la homoj strebantaj por interkompreniĝo, plifortigi reciprokajn, amikajn rilatojn, ligi pluan amikecon kaj tiel vekti la reciprokajn konfidon inter la popoloj.

Antaŭ tridekkvin jaroj finiĝis la dua mondmilito, ĉe kies fino aperis nova minaco por la homaro — la atombombo, kies terurajn efikojn konatigis al ni japanaj esperantistoj en sia dokumento „Hiroŝima-Nagasaki“. Surbaze de la pacideo de la lingvo internacia in batalos por la malstreĉiĝo kaj daŭra mondpaĉo.

Merklin apud K. Vary,
la 14-an de junio 1980

*Partoprenantoj de la III-a internacia
renkontiĝo de ercmontraraj esperantistoj
(Subskribis 48 partoprenintoj kaj
gastoj)*

kunvokita kongreso de ĉiuj kristanaj monarĥoj por pridiskuti la kreon de nova organizo, nomita en la pericdo de la ĉeĥaj-hungaraj intertraktoj „ĝenerala interkonsento kaj ĝenerala alianco“. Jam la saman jaron la senditoj revenis hejmen kun nekonsiderindaj sukcesoj. Vere, malgaraŭ la protesto de la papaj rondoj estis subskribita kontrakto inter la ĉeĥa kaj la franca reĝlandoj, sed al la propono pri kunvoko de kongreso de la kristanaj monarĥoj Ludoviko la XI-a donis eviteman respondon sub la influo de la premo, farata de la eklezio.

Tiumaniere la unua akto pri paca kunekzistado, aperinta laŭ iniciato de reĝo Georgo de Podebradi, estis dum longa tempo forgesita. Tamen la ĉefaj ideoj de la projekto de Georgo restis vivaj ĝis nun, kaj, propradire, nur nuntempe ili realiĝas en la internacia politika praktiko. La ideo pri paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsamaj politikaj kaj sociaj sistemoj kaj la ceteraj ideoj de la projekto estas en nia tempo fundamentaj principoj de la Ĉarto de l'Unuigintaj Nacioj de post 1945, kiel la principo de paca solvo de la internaciaj disputoj, la principo de egalrajteco de la ŝtatoj. Tial tiun ĉi pacan dokumenton oni devas alte pritaksi precipe en nia tempo, kvankam ĝi, nature, estis esprimita per la terminaro de sia epoko kaj respegulas ties sociajn fenomenojn kaj konceptojn.

Kompilis: D. Haĝiev



Usono „modernigas“ la maliunan
sinjorinon Eŭropa per novtipaj
nukleaj raketoj. . .

ekumena voĉo de paco

Aŭstrio. En Viena Instituto de Paco okazis en aprilo 1980 internacia seminario „Eŭropaj eklezioj en batalo por malstreĉiĝo“. Partoprenis ĝin reprezentantoj de katolika, evangelia kaj ortodoksa eklezioj el 11 eŭropaj landoj okcidentaj kaj ankaŭ orientaj. Estis akcentite, ke eklezioj devas fariĝi efika faktoro por malstreĉiĝo ne nur politika, sed ankaŭ armada. Tiucele la partoprenintoj decidis prepari aranĝojn por sukcesigi la aŭtunan madridan kunvenon de subskribintoj de la Fina Akto de Helsinki.

Salvadoro. La San Salvadora ĝenerala vikario mons. Cortez dum gazetara intervjuo proklamis: „La murdita episkopo O. A. Romero iam diris al ni: „Ne timu la vorton komunismo, pli timu la malbonajn kristanojn.“ Eklezio strebas demokratian solvon de la nuna krizo en Salvadoro. Tial en nia lando eblas unuiĝo de kristanoj kaj marksistoj.“

Francio. En Liono estas centro „La Kristana Unueco“, fondita de P. Couturier, kiu nunjare festis 25 jarojn de ekzisto. Bazo de ĝia agado fariĝis ekumena katedralo kun 30-hora teologia instruado. Prelegas tie teologoj de plej diversaj konfesioj pri temoj, celantaj krei medion de unueco en diverseco.

Hindio. En hinduista pilgrimloko Puri, sur bordo de la Bengala Golfo, estis fondita Centro por dialogo inter kristanoj kaj hinduistoj.

Brazilo. Brazila episkopo Klaŭdio Hummes subtenis strikon de 300.000 industriaj laboristoj en la regiono de Sao Paŭlo, postulantaj plibonigon de laborkondiĉoj. Dum diservo sur la sporta stadionio li diris: „La striko estas pravigita. Ekzistas ja reala eblo ŝanĝi la historion — dependas tio de ni ĉiuj.“

Hungario. En Budapeŝto okazis de 12-a — 15-a de majo internacia seminario de la Kristana Pacokonferenco, kiun partoprenis 60 reprezentantoj de eklezioj el 17 eŭropaj landoj kaj ankaŭ el Usono, Latin-Ameriko, Azio kaj Afriko. Estis konstatite, ke unu el la plej gravaj samtempaj taskoj restas la batalo kontraŭ pligrandigo de l'armado kaj kontraŭ la provoj renovigi malvarman militon. La partoprenintoj eldonis proklamon, instigantan ekleziojn, kristanojn kaj ekumenajn organizojn strebi por sukcesa okazigo de la madrida kunveno en la origina limdato, ratifo de Salt 2 kaj per tio kontribui al efika plibonigo de la internaciaj rilatoj.

Kampuĉio. La mondkonsilantaro de eklezioj sendis al Kampuĉio 57 tunojn da diversaj varoj,

precipe urĝe bezonaj krudĵoj por la loka farmacia industrio.

Venezuelo. Katolika eklezio fondis specialan oficejon por laboristaj demandoj.

Ĉilio. Konferenco de episkopoj de Ĉilio eldonis alvokon, postulantan demokratigon kaj normaligon en Ĉilio, precipe nuligon de la rajtsuspenda stato, enkondukita antaŭ pli ol 6 jaroj. Ili akcentis, ke tiu ĉi eksterordinara stato ne devas fariĝi konstanta kaj instigas katolikojn en Ĉilio kunlabori por demokratia renovigo de la partrujo.

Monda luterana federacio alvokis la membro-ekleziojn intensigi la porpacan strebadon.

Belgio — GDR. „Mia konscienco ne permesis al mi servi plu en NATO — tial mi foriris.“ Tion proklamis Imelda Verrept, la estinta sekretariino de la internacia sekretariato de NATO en Bruselo, la 29. 4. 1980 en televido de GDR. Post 7-jara servo en NATO ŝi transiris la 8-an de aprilo 1980 en GDR. En la televida intervjuo ŝi precizigis sian konsciencpremon jene: „La linio de NATO estas danĝera, ĝi ne deziras malarmadon, sed preparas militon. La verecon de miaj proklamoj mi povas pruvi per sekretaj dokumentoj, kiujn mi kunprenis.“

Vatikano. Laŭ instigo de la Internacia Asocio por Ekologio estis kompilita kaj la 7. 4. 1980 publikigita papa buleo, per kiu sankta Francisko el Assisi (1188—1226) estis proklamita patrono de ekologio, t. e. scienco pri sana vivmedio. S-ta Francisko rigardis la naturon kiel mirindan Dian donacon al la homaro. Li verkis ankaŭ belegan kanton de kreitaĵo, en kiu li dankas al la Plej Supera Forto por tiu ĉi donaco, kiun ĉiuj homoj kune devas disflorigadi kaj gardi kontraŭ ĉiuspeca neniigado.

USSR. Sinodo de la rusa ortodoksa eklezio eldonis proklamon, en kiu ĝi esprimas profundan maltrankviliĝon pro la nova plifortigado de la internacia streĉiĝo. Maltrankviligaj estas diversaj eventoj — de la decido de NATO pri dislokado de novaj mezdistancaj atomraketoj en Okcidenta Eŭropo, frostigo de la ratifo de SALT 2, ĝis la penoj pri bojkoto de la olimpiado en Moskvo.

La proklamo instigas ĉiujn homojn de bona volo en la tuta mondo kontribui al forigado de ĉiuj negativaj fenomenoj en la internacia vivo per disvastigado de internacia amikeco kaj fido, por ke ĉiuj popoloj povu reveni sur la vojon de malstreĉiĝo, malarmado kaj sekurigado de la tutmonda paco.

Usono. Konata usona pastoro Ralph Abernathy proklamis, ke li neas la eksterlandan politikon de provokado de internaciaj krizoj, kiu celas forturni la atenton de enlandaj politikaj problemoj. Usono devus fine jam dediĉi pli da zorgo kaj rimedoj al solvado de la ĉefa problemoj — „miliono da suferantoj de malriĉeco en la propra lando“.

NSR. En urbo Mülheim kunsidis en tagoj de 9—11. 4. 1980 plilarĝigita prezidantaro de la Kristana Pacokonferenco. Reprezentantoj el 21 landoj pritraktis problemojn, kaŭzantajn lastatempe stagnon de procedo de la internacia mal-

streĝigo — inter ili ĉefe ankaŭ la decido de NATO pri dislokigo de mezdistancaj atomraketoj en okcidenta Eŭropo — kaj konsultis eblojn de ilia solvado.

La finkomuniko akcentas, ke la Kristana Pac-konferenco strebas plifaciligi la necesajn solvojn per plenumado de sia ĉefa, misia tasko: peno je kunlaboro kaj kreado de fido inter ĉiuj popoloj, mobilizo de la kristana publiko en ĉiuj landoj por subteni la malarmajn proponojn. Plue ĝi instigas ĉiujn ekleziojn en la tuta mondo daŭrigi kaj intensigi siajn penojn por justeco kaj tutmonda paco. Traktado de la daŭra komitatkunsido de la Kristana Pac-konferenco estas preparata por oktobro 1980 en Eisenach, CDR.

Hindio. Katolikaj episkopoj en la hinda ŝtato Kerala instigis ĉiujn kristanojn, sendiference de iliaj konfesioj, unuiĝi al laboro por sociala justeco kaj progreso, kio estas celo de la kristana viv-koncepto.

Tiacele ili ellaboris planon pri akiro de laborlokoj por 100 000 homoj, sendiference de ilia sociala situo kaj religia aparteneco; la plano devas esti realigita dum ununura jaro! Poste — en ankoraŭ pli longa tempo — devas efektiviĝi pluaj proponoj por konstruado de loĝdomoj kaj novaj instigoj en la eduka sfero.

Britio. Brita Konsilantaro de Eklezioj donis en la jaro 1979 al grupoj, batalantaj kontraŭ rasismo en Britio, 60 000 lirojn por helpo al homoj, suferantaj pro la rasa diskriminacio.


Sudafrika respubliko. En la urbo Port Elizabeth kunsidis episkopoj de 8 diocezoj, prezide de tiea episkopo Murphy. Ili pritraktis socialan problemon en la lando, postulante socialan justecon por ĉiuj loĝantoj.

Urugvajo. La episkopa konferenco de Urugvajo esprimiĝis por renovigo de sindikataj rajtoj kaj liberecoj. La eldonita dokumento akcentas rajton de laboristoj unuiĝadi por pledi siajn interesojn, kio estas unu el la elementaj rajtoj de la homa personeco. La ŝtato ne rajtas rifuzi ĝin kaj ĉesigi la sindikatan agadon.

Brazilo. Brazila katolika eklezio esprimiĝis por realigado de agrara reformo, kiel ununura garantio por likvido de gravaj socialaj problemoj en la brazila provinco, kie la grundo estas nejuste interdividita. Per la nuna situacio ege suferas malgrandaj terkulturistoj kaj agrikulturaj laboristoj, precipe Indianoj. La samon konstatis eĉ la brazila eklezia katolika misia konsilantaro por indiĝenoj (CIMI).

Alĝerio. Cefepiskopo de urbo Alĝero L. E. Duval eldonis paskan animzorgan leteron, kiun li dediĉis al dialogo kristana-islama, instiganta al ekumena evoluo de ĉi tiuj monotismaj religioj, kontribuonta al harmoniigo de la tuthomara vivo.

J. K.



N GUYEN TRAI

Pham Van Dong

Cefministro de SR Vjetnam

Nguyen Trai estas patrioto, kiu amas profunde, forte, varmege amis sian patrujon kun tuta animo kaj koro de heroo. Por Nguyen Trai, amo al la patrujo estas popolamo; por savi la patrujon li devas apogi sin sur la popolo, alporti al la popolo pacon. La filozofio „homamo kaj bonkoro“ de Nguyen Trai, finnalize estas nenio alia ol amo al la patrujo, popolamo: la plej granda homamo estas lukti ĝisfine kontraŭ la invadantoj, neniigi la barbarojn por la nacisendependeco, por la feliĉo de la popolo.

Sian tutan vivon Nguyen Trai sopiregas: kion fari por la popolo, por la plej malfeliĉa turmentita popolo. En la komenco de „Finvenka Proklamo sur la Ngô“ li skribis: realigi homamon, bonkoron oni devas unuavice alvenigi pacon por la popolo“. Nguyen Trai estas aŭtoro de „Geografia libro“ siatempe valora geografi-historia, ekonomia libro. Bedaŭrinde, Nguyen Trai ne havis sufiĉe da okazoj por uzi sian sopiron kaj

genion por kontribui al la patrujo, popolo kaj vivo.

Rememcrante pri Nguyen Trai, ni pensas pri la patrujsava heroo, samtempe ni rememoras la grandan verkiston, grandan poeton de nia nacio. De la „Finvenka Proklamo sur la Ngô“, ĝis la leteroj senditaj al la malamikaj generaloj, ĝis la ĉinlingvaj kaj nacilingvaj poemoj la plumo de Nguyen Trai postlasis al ni multspecajn verkojn kaj ili ĉiuj estas pintoj de arto, estas nepriskribeble belegaj! Tiaj multflankaj genioj unuigitaj sur ununura homo estas ne tre ofta fenomeno! „Finvenka Proklamo sur Ngô“ estas la plej bela epopeo de nia nacio. Aŭskultu Nguyen Trai kondamni la invadantojn: „Ni devas. . . kolere ĵuri: ne eblas kunvivi pace kun niaj malamikoj.“

Jen kelkaj versoj priskribantaj la venkspektaklon de nia armeo: „Niaj batalelefantoj trinkante finsekigis la riveregajn akvojn. Niaj glavoj tranĉigante forpolvigis la montajn ŝtonojn!

La du helparmeoj malamikaj kiuj ne pretiĝas turni siajn piedojn estis tute venkitaj, La malesperantaj banditoj en ĉiuj ĉirkaŭitaj citadeloj, por kapitulaci, findemetis siajn soldatvestaĵojn.

La malamikaj generaloj malliberigitaj svingetas siajn tigrajn vostojn por almozi nian kompaton!

Timante malpurigi niajn sanktajn glavojn, imitante la bonkoron de Dio, ni plene homame ilin tute liberigis!

Jen la lasta parto, kiam ni finbalais la invadantojn:

*„De nun nia patrolando firmiĝas
Pro tio la tutaj riveregoj, montoj beliĝas
La universo senelireja nun estas feliĉa
La suno, la luno malhelaj nun brile lumas
Por krei porĉiaman pacon,
Por finlavi la miljaran honton!“*

La leteroj adresitaj al la malamikaj generaloj en „Skribaĵoj en la armeo“ kiujn Phan Huy Chu traktis „havantaj potencon je dekmil soldatoj“ estas modelo de elokvento. Aŭskultu Nguyen Trai akuzi la Mengeneralon Phuong Chinh:

„Aŭskultu la aĉa militpirato Phuong Chinh: La moralinstruo de generalo devas konsideri la homamon, la bonkonduton kiel trunkstumpon, la inteligentecon heroecon kiel branĉon. Hodiaŭ vi speciale trompas, amasbuĉas la nekulpantojn, pelas la homojn al morto senkompate. Tion Dio ne pardonas, la sanktuloj kaj homoj ĉiuj furiozegas, tial ju pli vi ĉiujare piratas, rabias, des pli vi malvenkegas.“

Nguyen Trai ne forgesis la tiatempan perfidulajn mandarenoj kaj ĉiujn dung-soldatojn. En letero adresita al ili, Nguyen Trai skribis:

„La prahomoj diris: „La korvo forfluginta finfine revenas naskiĝloken, la vulpo mortanta turnas sian kapon montdirekten!“ Se eĉ bestoj tiel kondutas, despli prave vi homoj, kiel vi sintenadas? Niaj armeoj ien ajnalvenintaj, akiras bonan reputacion, la popoloj el ĉiuj kvar anguloj de la lando portis unuj la aliajn por nin sekvi. Kaj

vi, viaflanke se vi korektiĝus, forlasis la malbonan vojon: profitu la ŝancon: ĉu vi restu en viaj rangoj por spioni, ribeli ĝustatempe, ĉu vi kapitulacu, per tio vi ne nur puriĝus el la malnovaj hontoj, sed estus pardonatoj poste. Mi neniam promesas por plenumi poste la promesojn. Se vi sekve fiamus la malamikajn postenojn, kontraŭstarus la nacian armeon, post la neniigo de la malamikaj citadeloj, vi estus pli severe juĝotaj ol la malamikoj!“

Estas klare ke Nguyen Trai unuflanke akuzis la krimojn de la invadantoj, energie atakis ilin, aliflanke ĉiam klopĉdis tiri al ni la venkon de la naciŝava milito kun plej eble malpli da elspezoj, samtempe rekonstrui la normalajn rilatojn kun la Men-dinastia Ĉinio.

En unu el la leteroj skribitaj al Vuong Thong — la ĉefgeneralo de la invadanta armeo — Nguyen Trai uzis sian elokventecon por montri al li lian nepran finmalvenkon. Nguyen Trai numeris la ses punktojn de la nepra finvenko:

unua: la malamikaj armeoj okulvideble pli kaj pli malfortiĝis; dua: la helparmeo de la malamiko estos nepre neniigita; tria: la plej fortaj armeoj de reĝo Men estis devigataj retiriĝi norden por antaŭgardi la Hunojn; kvara: la ĉina popolo laciĝe malkuraĝiĝas sub troa pezo de la milito; kvina: ne estas unueco en la sino de la reĝ-reĝimo Men, estas fratmortigo; sesa: (originale) „Ni nun bonkaŭze ribelegas, estas unueco inter niaj gvidantaro kaj malsupranoj; niaj herooj tutkore sinoferas; niaj soldatoj estas bone edukitaj, niaj armiloj pli efikaj, niaj homoj samtempe kulturaras rizon kaj militas; viaj soldatoj ĉirkaŭbaritaj en citadeloj mizerlaciĝas, tiras al si nepran malvenkon.“

Sciante, ke Vuong Thong nur atendadas la helparmeon li substrekis en la letero: „Malnova proverbo diras: „Malproksima akvo neniel povas estingi proksiman brulegon.“ Ekzemple alvenos via helparmeo, tio nenion utilas por via venko. Finfine Nguyen Trai etendis al Vuong la savstangon:

„Se vi volus retiri Ĉinlanden viajn armeojn, surtere ni riparos por via bezono la vojojn, la pontojn; surakve, ni donos la barkojn se tio al vi plaĉas por ke vi reveniĝu vian soldataron milfoje trankvile, sendanĝere.“

Nguyen Trai estas vera politikisto havanta la klaregajn rigardojn, samtempe li estas lertega diplomato.

Tiam kiam la Usonaj invadantoj premegegas nian Sudon, ni devas relegi la suprajn heroajn paĝojn de Nguyen Trai, revizii la heroajn heredaĵojn miljarajn de nia lando, de nia popolo. La invadantoj sur ĉi tiu tero nepre estos punitaj!

Kio koncernas la poemojn de Nguyen Trai, ni devas atenti pri ilia lingvo, ĉar la lingvo de Nguyen Trai estas nia multvalora hereda posedaĵo. Analizi liajn poemojn ne egalas laŭtlegi liajn kelkajn versojn:

„Rigardante bluan akvon, lazuran monton, la barkoj ripoze metas siajn kapojn sur la sablobordo,

Sub nokto serena, arĝenta luno, la senfamilia vojaĝanto nostalgie suprenas aliulan hotelon!“

La poemoj de Nguyen Trai estas tiel belaj! La nacia literatura ĝardeno havas siajn florojn, fruktojn belajn, bonodorajn, bongustajn, sed ŝajne ni ne plene malkovras la verajn valorojn; nia nacia lingvo havas siajn proprajn belecon, riĉecon, ni devas ĝin ami, uzi, plibonigi, kial ni volus prunti ion el alia lingvo?

La poemaro de Nguyen Trai estas koranimo de Nguyen Trai, purega kaj vivoplena. Iu diris ke la poemoj de Nguyen Trai estas malgajaj, ĉar la vivo de Nguyen Trai estas malĝoja. Jes, inter lia poemaro estas poemoj, versoj malgajaj, pro kio ni ĉiuj ja sciis, sed la tuta kolekto estas vivama, homama, la animo de Nguyen Trai vivharmonias kun nia tuta nacio ĝojfreŝa.

Nguyen Mong Tuanc, amiko de Nguyen Trai laŭdis lin jene: „Pura vento blovetas la oran etaĝon, li aspektas sanktulo en jada palaco. La geniulo, faranta belajn bonfaraĵojn por nia lando, de la prahistorio ĝis la nuna epoko, estas unika, krom li ne vidiĝas dua simile. Nguyen Trai ne estas sanktulo. Li estas vera homo, kies du piedoj firme staris sur vjetnama tero, kies kapo ŝirmiĝis sub Vjetnama ĉielo, lian animon alblovis tiutempa vento, komuniĝis profunde kun sia popolo, dum la tuta vivo oferis por nobla idealo. Nguyen Trai estas la fierajo de la nacio, la kvintesenco de la nacio. Ĉiuj faraĵoj, verkaĵoj de Nguyen Trai estas naciama kaj nacifiera himno. Nguyen Trai estas tre inda je nia plerespekto kaj estimo. Glorante la nacian heroon, ni ja purigas la „miljaran doloron“ de Nguyen Trai. Jubilei Nguyen Trai estas rememori lin, amikiĝi plie kun li: niaj nunaj politikistoj, armeokadruloj, naci-historiaj studantoj, niaj verkistoj, poetoj. . . ĉiuj devas plie kompreni, lerni Nguyen Trai.

Nguyen Hai Trung

Vin senfine sopirbedaŭras ni, ho Nguyen Trai!

Ho! Nguyen Trai, Vian Moŝton milmilfoje ni sopirbedaŭras!

Nun tutmondo korincense festas Vian sescentjaran jubileon

Estas kun maro Via patriotismo komparata,

Estas kun ĉielo Via popolamo egaligata.

Homamon vian tuta Partio respektas,

Amazorgemon vian tuta nacio fidele lernas.

La novaj invadantoj Mao-idoj de viatempaj invadintoj Menlastjare battimigitaj forkuris blankkaphare!

Ho! NGUYEN TRAI Via Moŝto sopirbedaŭrata milmilfoje

(1) Ngô — antikva nomo de Ĉinio

JIRI KORINEK

ANTAŬPRINTEMPO

Ce l'fin' de februaro komencas merloj kanti kaj sun'glaciojn fandi, cbea se la jaro.

Kaj vintra kontraŭstaro poiom devas lanti. En parkojn venas planti la ĝardenista aro.

Kaj post la neĝdegelo aŭguras vent' profeta pri la printempa belo.

kaj la sorĉist' naturo paletron tenas preta por glora uverturo.

PARKO EN APRILO

Al sablej'parkmeze brilas sun' karese kaj nun, post dekkvara hor', kia svarmo de kolor'.

Ludas la infanoj, viglas etaj manoj, brilas ĉie bunta jak' de spertul' pri sablobak'.

Jen rigard' instrua: flava, ruĝa, blua ĉe komuna sabla verk' sub disbranĉa olda kverk'.

Tulipoj kaj narcisoj sub la sunaj kisoj, fringoj, merloj kaj paser' pepas, ĉirpas: primaver'!

Kuleret', sitefo, juno, sano, belo, jen aspektas en la pac' posttagmez' en parka spac'.

Bildo certe plaĉa tial ĉiu saĝa pri la paco penu plej sur la granda mond-sablej'.

KONSILO TRIANGULA

Kara, ne avara kaj ne vortoŝpara estu verso amdeklara, kiun skribas vi el sento klara.

Skribas kaj ekipas, tamen ne disipas eĉ se kava flat' surlipas, vi per banalaĵoj, kiuj vipas.

ĝi ja, tiu via, estas ne glacia, eble eĉ de am' ebria. sed imponas al ŝi fals' nenia.

Nu do, en konkludo jen la task'por studo al amonto sen erudo: versu kun belgusto sed sen trudo.

Glosoj

erudi — funde kaj detale instrui
lanti — malrapidi

la generacio

Ĉapitro el la priokupacia romano „Generacio“

En oktobro de la jaro 1942 unuafoje aperis en la stacidomaj atendejoj, kaj ankaŭ en la vestibloj de drinkejoj kaj bordeloj la grandaj blankaj afiŝoj. Oni presis sur ilin per grandaj majuskloj la averton „Achtung!“, per iom malpli grandaj „Banditengebiet“, kaj pli malsupre la ordonon „Gewehr greif- und feuerbereit halten“. La tuta sekva jaro estis konfirmonta la ĝustecon de la fiero nomo „bandita tereno“. Ĉi nomon la urbo¹ konservis ĝis la fino — ĝis la tago, kiam ĝi ĉesis ekzisti.

Se iu trudus al si la senbezonan penon strekdesegni la kurbon de la persekutad-intenseco, tiu rimarkus, ke ĝi altiĝis per granda ĝibo ĉiujare dum la malfrua aŭtuno.

— Aŭtune, kiam sekvas ĉiujara natur-morto, kaj la mondo fariĝas nuda, nigra kaj eĝa, alvenas tristo. La aŭtuno estas sezono abomena por ni — poloj. Nia intelekto perdas sian imunecan naskitan el la optimismo de la printempo, superabundo de la somero kaj riĉeco de la rikolt-pericdo. Estas jam nenio por atendi, oni atendas nur mallumon kaj malvarmon — tiam ili² atakas. Ili ne estas komplete idiotigitaj. Ilia filozofio kaj psikologio, kaj ankaŭ praktikado de krimoj lasas nenion por deziro — asertis doktoro Konstanty.

Sed kvankam Jurek konsentis kun lia hipotezo, li tamen klopodis kompletigi ĝin per influo de la kaŭzoj de la politika naturo.

Oni pendumis tiutempe kvindekona komunista laŭlonge de la trako de la ĉirkaŭurba fervojo kaj oni punis la urbon per kontribucio. Ĝi estis unua publika kaj amasa ekzekuto. Batis la korojn de la homoj la unua plumbe verŝiĝanta ondo de teroro, longedaŭra kaj plipotenciĝanta senĉese, ĝis la orgio dum la aŭtuno de 1943 kaj poste dum la ribelo. Teroro, kiu premis la cerbojn per fera manego kaj kiel ŝtono metiĝis sur la animon.

Samtempe aperis unuaj ruĝaj afiŝoj³ kaj pendumiloj en Marki⁴ kaj Sĉenslivice⁵. Tie, kie oni ne starigis penudmilojn, la korpoj de mortigi-

toj pendis kvazaŭ nigraj stalaktitoj sur transversaj stangetoj de la telegrafaj fosto.

Patrinoj irantaj al la urbo metis polmojn sur la okulojn de siaj infanoj, sed ili mem ne scipovis forturni rigardon. Vento turnadis la korpojn de la mortigitaj, pendumitaj inter la brungriza, jam senverd'gita tero kaj la malhela, malalte perdinta ĉielo.

Ĝiĝis venis al la metiejo vere animskuita. Kun siblo li enturadis aeron per la naztruoj. Ĉi reflekson konis liaj amikoj de diboĉadoj kaj aventuroj, ĝi estis certa signo, ke li komencos drinki. Li silentis, kaj instigate de Fijalkovski, elmurmuris:

— Iru, trakuri Sĉenslivice, kaj vi rezignos plue babiladi. Ni ne povas jam pli longe atendi, frato mia, oni devas puni ilin almenaŭ per hakilo. Pruntedonu al mi ĝis la sabato por kvaronbrando, ĉio falas al mi el la manoj.

Poste li ĵetis la malplenan botelon al la angulo kaj diris, obtuze rigardante antaŭ sin:

— Kornikoj ne sidiĝas sur ilin. Kornikoj ŝatas elbeki la okulojn, sed ili nur traflugas supre. La korniko estas ruza birdo, kiam vi iras tra la kampo kun malplenaj manoj ĝi allasas vin ĝis dek paŝoj kaj poste apenaŭ iomete desaltas, sed se vi portus almenaŭ vergon en mano, ĝi pensas: pafilo — kaj de cent paŝoj ĝi forflugas. Ili ne sidas, ili flugas supre — malsupre staras germano kun karabeno. . . li gardas.

Post laboro Jasio Krone aliris al Rodak, kiu ŝanĝis la veston kaj alparolis lin.

— Mi scias Rodak, kial vi malkontentas kontraŭ mi, certe pro tiuj ĉifonoj de Vinterhilfe. Mi. . .

— Kion? Vi pardonpetos min?

— Ne. Nur mi, vi komprenas, mi volus aliĝi al vi, tio signifas al la Popola Armeo⁶. Stulte estas eĉ paroli pri tio hodiaŭ, sed tiujn ili pendumis, kaj mi. . .

— Kaj vin ne — ĝoju do.

— Al la diabloj. . . kun vi oni povas neniel paroli. Mi al vi kiel al homo, kaj vi al mi tiujn kelkajn ĉifonojn ne povas forgesi.

— Mi povas. Klopodu pri tio. Koncerne la Gvardion, ne mi akceptos vin, sed akceptos vin la lignajisto de sep doloroj, Stacho aŭ Jurek, lignajistaj lernantoj. Iru al ili. Ili estas batalistoj kaj mi estas stulta maljunulo. Mi eĉ sur la ruĝan afiŝon ne plu taŭgas.

En tiuj tempoj renkontiĝoj okazadis en la „borso“. La borson fiksis fragmento de strato Volska inter la barieroj ĉe placo de Kerceli kaj angulo de strato Mlinarska.

Estis sciate, ke oni povas renkonti tie ĉiujn, restarigi rompitan kontakton, ricevi laboron, transdoni sciigon.

Dimanĉe antaŭ tagmezo, feste vestitaj kun gluitaj al la vizaĝo pecetoj de sorbopapero en lokoj vundetitaj de la razilo alvenadis ĉi tien preskaŭ ĉiuj gvardianoj el Vola⁷. Ili promenadis seriozaj ĵetante ĉiufanken esplorajn rigardojn. Al ili ŝajnis, ke ili estas nereconeblaj. Dume la plej stultan policagenton povis ekinteresi tiuj

Bohdan Czeszko (Ĉeŝko) — (nask. 1923) — estas verkisto, aŭtoro de priokupaciaj kaj primilitaj romanoj. Dum la hitlerana okupacio — membro de ZWM (Asocio de Junaj Batalantoj) kaj de AL (Popola Armeo). Li partoprenis en la atenco kontraŭ Cafe Club kaj batalis en la Varsovia ribelo.

senĉese formiĝantaj, diverskonsistaj kaj vigle interparolantaj homgrupetoj. Kaj fakte oni likvidis la borson en postaj tempoj, ĉar ĝi spitis al ĉia konspirado, malgraŭ ke ĝi bone plenumis sian taskon tiam, kiam mankis ejoj. Estis agrebla sin nombri almenaŭ unufoje dum la dimanĉo.

En la borso Stacho kaj Jurek renkontis Sekula-n. Ili intervidis sin unufoje de la tempo de la malsukcesa laboro.

— Uf — li ekĝemis kaj sidiĝis kun videbla kontenteco sur ĝardenan, kunmeteban seĝeton en la bierejo de avinjo Kataĵina, kien ili eniris por ion manĝi. — Hirtiĝis ĉiuj kvazaŭ strigoj. Mi malofte vizitis la borson kaj bone, ke ni renkontiĝis. Ho, partianoj niaj, partianoj, vi mamutoj nmoveblaj kaj singardaj, bonaj knaboj, sed edzigitaj kaj tiel infanhavaj. Nu, kio kun vi, knaboj miaj, kio kun vi?

— Nenio, „Tribunon“⁸ al metiejo ni liveras. Redak ordonis agiti, li diras: „La organizo mem ne sufiĉas, faru flankan laboron.“ Tiu Fijalkovski, nu vi scias, tiu malgranda, tia preciza?

— Mi scias, nur ĉesu paroli al mi per „sinjoro“. Parolu laŭ nia maniero — Stasiek, vi — aŭ plej bone ne povas kalkuli je li. Post la ekzekuto ni iom embusikiĝis.

— Ili ektimis. . . Do, mi rakontos al vi ion. Vi ekscios tion el la „literaturo“.

Li parolis unue pri tiuj rezisto-agadoj, kiuj anticipis la ekzekuton. Li teksis longajn rakontojn plenajn je deflankiĝoj pri noktoj pasigitaj ĉe la produktado de minoj. „De kie preni plaston aŭ trinitrotoluenon⁹! De kie preni ĉi tiun trinitrotoluenon! — li laŭvoĉis, ĉar en lia memoro revivis ĉiuj ĉagrenoj antaŭantaj la efektivigon de la rezisto-agada plano. Poste li komencis analizi la konstru-detalojn de la minfuzeo, kaj tuj oni povus rimarki, ke ĉio ĉi estas novaĵoj, kiujn li ensorbis kun scivolo. Ili kliniĝadis super la skema desegnaĵo, kiun faris Sekula sur paperpeceto. Stacho demandis: „Kiamaniere — plus, minus? La kurento estas kurento.“ — Nu, vi nenion komprenas, la polusoj estas kiel en akumulatoroj: unu kurento plusa, dua kurento minusa, tio donas kurtan cirkvitan — sparkon, nu. . . kaj de la sparko ekbrulas tio, ĉi tie — pulvo. La pulvo detonacias kaj jen ĉio — klarigis Jurek.

— Jes. . . sed ĝi estas novaĵo. Ni provis alie. Ni enmetadis fuzeon de mangrenado en la plastokartoĉon, al la eksplodigilo ni alligis ŝnureton, kaj kiam la trajno alproksimiĝis, ni tiris la ŝnureton. Sed tio ne estis bona, la ŝnureto ofte paneis.

— Do tiam vi eksplodigis trakojn de la ĉirkaŭbra fervojo kaj trakojn en aliaj lokoj ĉirkaŭ la urbo. Sed tio ne estis bona. Germanoj riparis ilin tre rapide. Oni ne devas fari tiel. Oni devas bloki fervojan trafikon. Eksplodigita trajno blokas la trakon. Kaj en via kazo ili rapide ŝanĝos ŝpalojn kaj relojn, subŝutos iom da tero, kaj fino — la fervoja trafiko plu funkcias. Sed provu forigi trajnon, eksplodigitan trajnon — vi ŝvitegos, kaj ankaŭ la damaĝo estos pli gran-

da. Ni renversos trajnojn, sed tiam ni kontentiĝis per la trakesplodigado. Poste ili pendumis. . . kaj ili certe pensis, ke jam estos fino, ke ili nin timigos. Ili jam pafmortigadis nin po dekoj da miloj. . .

Nun Sekula rakontis nekredeblaĵojn.

— Kiel eblas tie ĉi, en la mezo de la urbo nia rezisto-agado — ili miris. — „Cafe Club“, „Mitropa“, presejo de „Nova Kuriero“.¹⁰ Centro de la urbo, centro de la germana kvartalo. Ĉefa Stacidomo plena de feriantaj germanoj, ŝarĝitaj per dorsosakoj krevantaj en la kunkudroj pro ŝtelitaĵoj trenantaj post si armilojn. En la stacidoma bufedejo „Mitropa“ — „nur für Deutsche“, homŝtopita, plena de bieraĉa kaj tabaka malbonodoro, plenplena de germanoj, el kiuj unuj ĝojis veturante okcidenten, kaj aliaj estis tristaj kaj sen pakaĵoj — tiuj veturis al fronto. . . Kaj en tiun ĉi kaĉon, en ĉiujn ĉi germanajn ĉagrenojn kaj ĝojojn eksplodis la gvardiaj grenadoj.

„Cafe Club“ — la eleganta germana bordelo nur für Deutsche, buklohavaj knabinaĵoj en la grizaj uniformoj kun fulmosigno sur la maniko, rekompencantaj al si la danco-faston ordonitan en la patrio. Oficiroj kun cikatroj sur la vangoj, kun haroj laŭerinace pritonditaj, gaje ebrietaj. Uniformoj grizaj, nigraj, brunaj. Uniformoj kun skeletkapoj. En tiun ĉi svarmejon de ardataj korpoj, en tiun ĉi blekejon de germanaj superhomoj — grenadoj. Dum kelkaj tagoj almenaŭ ne mekos ĉi tie la saksofonoj. Ili devas forlavi la makulojn de sango, de nigra kafo kaj likvoroj. Ili devas forsendi leterojn kun la nigra bordero.

Ili sciu, ke mankas por ili loko sur la tero, ke oni mortigas ilin kiel pedikojn en ĉiu kaŝejo, ke ili senpune ne murdos.

Iom malvastiĝis en la malhela kaŝejo de avinjo Kataĵina. Ili eliris straten. Ili iris silentaj, duonfermante okulojn pro la lumo. Vi konas tiajn dimanĉajn posttagmezojn ĉe la aŭtunfino. Kredantoj eliras el la preĝejoj post la lasta meso. En aero varma de la lasta varmo, mola kvazaŭ vato, feste harmonie sonas homvoĉoj kvazaŭ ili alvenus trans la akvo. Infanoj tuŝas per langoj kolorajn bombonojn, puŝas antaŭ si grandajn papiliojn kolore farbitajn, la papilioj klakas per la lignaj flugiloj. Oni volus aŭdi la kokokrion kaj la eĥon de ĉiuj preĝejoj sonoriloj, sed sonorilojn oni deprenis de la turoj kaj destinis ilin al ferrubo.

glosoj

1) Varsovio 2) nazioj 3) afiŝoj, sur kiuj la okupaciantoj komunikis mortverdiktojn, estis ruĝaj 4) urbo en varsovia vojevodio 5) kvartalo de Varsovio 6) Guardia Ludowa — konspira, militista organizaĵo, kreita de PPR (Pola Laborista Partio) komence de 1942, kies celo estis batali kontraŭ hitleranojn 7) kvartalo de Varsovio 8) „Trybuna Wolności“ (Tribuno de la Libero) — konspira gazeto de PPR. 9) TNT — tre potenca eksplodaĵo 10) „Nowy Kurier Warszawski“ (Nova Kuriero Varsovia) — faŝisma inform-propaganda ĵurnalo, eldonata de la okupaciantoj. Ĝi estis bojkotita de la pola socio. La 24-an de oktobro 1942 partizanoj de Popola Gvardio faris sabot-atencion kontraŭ la presejon.

AFRIKO — KONTINENTO DE 1000 LINGVOJ

Wiktor Weggi

Afriko estas loĝata de preskaŭ 400 milionoj da homoj. La lingvonombro de tiu kontinento oni taksas je super mil. Tiu granda lingva fandujo havas pli grandan kapaciton: ĝis nun rilate Afrikon oni ankoraŭ ne fiksas la samajn lingvomezurojn. Multaj lingvoj restas ankoraŭ ne sufiĉe esplertaj kaj — kiel asertas iuj — multaj lingvoj restas ĝis nun eĉ ne malkovritaj.

Precipe riĉaj je lingvoj estas terencj apud Gvinea Golfo kaj en la baseno de rivero Kongo. Estas ŝtatoj, en kiuj la nombro de gentoj, lingvoj kaj dialektoj estas vere miriga. En la malgranda distrikto Ogoĝa en Niĝerio la loĝantaro uzas dektri lingvojn, kaj en la tuta lando eĉ 250. En Zairo estas uzataj ĉirkaŭ 200, kaj en malgranda Ganao 70 lingvoj.

Ĉe tia lingvomulteco la faktoro, kiu integras gentojn kaj naciojn — almenaŭ sur la nuna etapo de disvolviĝo de Afriko — estas la eŭropaj lingvoj. Pro ilia kolonia kaj novkolonia deveno, kaj ankaŭ pro la vekiganta afrika patriotismo la eŭropaj lingvoj estas konsiderataj de la loĝantoj de la nigra kontinento kiel necesa malbono. „Strange fartus membroj de la brita parlamento, se ili devus debati en la hispana aŭ franca lingvoj. Ni tamen salutas la anglan kiel komfortan rimedon de interkompreniĝo“ — diris iam Nkrumah, parolante en angla lingvo en la ganaa parlamento. Tiu konstato estas aktuala ankaŭ hodiaŭ.

Preteratentante la araban, kiu estas oficiala lingvo de la landoj de Norda Afriko kaj parte de Maŭritanio, Ĉadio kaj Sudano, la tutan teritorion de Afriko sude de Saharo oni povas dividi en kvin lingvozonojn: angla, franca, portugala, hispana kaj afrikansa.

Tiu lasta lingvo postulas kroman komentarion. Ĝi estas, apud la angla, oficiala lingvo de la Respubliko de Suda Afriko kaj kontraŭleĝe de la okupita de ĝi Namibio. Tiu lingvo estas kalkulata al la eŭropaj lingvoj, kvankam neniu en Eŭropo parolas en ĝi. Ĝi estas patruja lingvo de pli ol 4 milionoj da blankuloj, kiuj regas super 16 milionoj da afrikanoj. Ĝia deveno estas eksterordinare interesa, ĉar ĝi estas artefarita kaj politika kreaĵo, elpensita de la blankaj koloniistoj kiuj amase komencis alflui la Sudan Afrikon en la XVI-a jc. Afrikansa devenas el la nederlanda lingvo, sed ĝi akceptis ankaŭ multon el la franca kaj germana lingvoj kaj alproprigis al si

multajn hotentotajn vortojn. En tiu lingvo aperas gazetoj kaj estas verkataj libroj. En la afrikansan oni tradukis Sekspiron kaj aliajn grandajn verkistojn. Problemon prezentas la teknikaj vortoj. En tiu okazo oni profitas la nederlandajn vortojn, kiujn oni konvene adaptas.

Mi jam menciis, ke tiu lingvo estas politika elpenaĵo. Ĝi fariĝis patruja lingvo de la t. n. afrikanuloj, do blankuloj de nebrita deveno. Posedo de propra, aparta lingvo estas profitata de afrikanuloj kiel argumento, ke ili havas nerefuteblan rajton pri la sudafrika tero, ke ĝi estas ilia patrujo, kiun ili neniam forlasos. Tiuj argumentoj estas realigataj en la vivo en formo de politiko de apartismo t. e. de aparta evoluado. Ne hazarde tiu vorto devenas el la afrikansa lingvo.

En Sud-Afrika Respubliko, kie ekzistas plej granda amasiĝo de hinduaj loĝantoj, sufiĉe popularaj estas ankaŭ hinduaj lingvoj. Multajn koloniojn de hinduoj oni povas renkonti ankaŭ en Tanzanio, Keniĵo kaj Maŭricio.

La sento de nacia fiero kaj kulturaj tradicioj de Afriko naskis lastatempe tendencojn al kreado, kaj pli ĝuste al tipado de la t. n. kontaktaj lingvoj inter indiĝenoj, kies atingodistanco transpaŝas malproksimen ekster la tereno de la gentoj, parolantaj en ili. Laŭ indikoj de UNESCO en Afriko estas 40 tiaj lingvoj, kaj multaj aliaj havas similajn ŝancojn al tia avancado.

La decidan superecon havas kisvahili, kiu estas oficiala lingvo de Tanzanio, kaj ĝenerale ĝi estas uzata en Kenjo, Ugando kaj orienta Zairo. La nombron de la homoj parolantaj en ĝi oni taksas je 30—50 milionoj.

Similan rolon en Okcidenta Afriko ludas la lingvo hausa (precipe universala en komerco) parolata de 16—20 milionoj da loĝantoj de norda Niĝerio, suda Nigerlando, certaj regionoj de respubliko Benino, Ĉadio, Ganao.

Aliaj gravaj kontaktaj lingvoj estas: mambaŝona, tonga (Orienta Afriko), kongo, lingala, rundi (Ekvatora Afriko), ibo, joruba (Okcidenta Niĝerio), akan (Ganao), bambara (Malio), mande, wolof (Gambio, Senegalio), kosa, suto, zulu (Suda Afriko) kaj amhara lingvo en Etiopio.

Kiajn kondiĉojn devas plenumi la kontakta lingvo?

Unue — ĝi devas posedi alfabeton komprenatan ankaŭ de aliaj gentoj. La plimulto de afrikaj lingvoj uzas latinan alfabeton.

Due — ĝi devas posedi ekvivalentojn de nocioj naskitaj de la nuntempa civilizacio.

La plej simpla solvo estus evidente profiti eŭropajn lingvojn. La naciismaj tendencoj naskis tamen impeton al kreado de propraj idiomoj bazitaj sur indiĝenaj, afrikaj vortelementoj.

En la lingvo hausa aerdromo estas — „filin jirgin sama“ (placo de ĉielboato), sputniko — estas „abokin tafiya“ (vojaĝkamarado) kaj privata telefono — kio ŝajnas al mi granda troiĝo — nomiĝas „daya daga cikin telefon biyu wadan da da hade mahad waya ta layo daya“ (unu el du

telefonoj, kiuj estas konektitaj al renkonto per drato de unu linio). Tiel aŭ aliel, pasos ankoraŭ multe da tempo, antaŭ ol en kontakta lingvoj oni povos studi cibernetikon aŭ sociologion.

Trie — oni devos evoluigi la fundamentan instruadon en tiuj lingvoj, ne rezignante memkompreneble la instruadon de la eŭropaj lingvoj.

Daton de definitiva likvido de analfabetismo Afriko traŝovis en nedifinitan tempon. Mankas instruistoj kaj mono. Multon oni faras en tiu sfero en Malio, Niĝerio, Nigerlando, Etiopio, Angolo, Mozambiko. Rolon de lernejoj transprenis sukcese radio kaj televido. Ili propagas ne nur instruadon de indiĝenaj lingvoj, sed ankaŭ historion kaj tradicion de Afriko. Jam nun ekz. la ganaa radio emisias siajn disaŭdigojn en septaj lingvoj kaj 82-miliona Niĝerio en dekdu lingvoj.

Kvare — kio ligiĝas kun la antaŭa punkto —

oni devos prepari konformajn lernolibrojn kaj vortarojn (ili jam ekzistas en lingvoj: kisvahili, hausa, lingala, bambara, joruba, ibo) kaj eldonadi en tiuj lingvoj gazetaron kaj literaturon. En kisvahili estas eldonata oficiala registara ĵurnalo de Tanzanio — „Uhuru“, „Kedi“ en Zairo, „Azama“ kaj „Daraza“ en Kenjo, en amhara lingvo „Addis Zamani“, en la hausa „Jakadiya“, „Gaskiya ta Fi Kwabo“. En tiuj lingvoj disvolviĝas ankaŭ afrika literaturo.

Kiel oni vidas, taskoj kaj problemoj svarmas, kaj la afrikaj registaroj direktiĝas laŭ saĝa penso prenita el zulusa proverbo, ke el unu bastono oni ne konstruos vilaĝon. Estas bezonata tempo kaj pacienco. La nigra kontinento, tiu granda poligloto, serioze komencas konstrui lingvon de interkompreno.

*Trad. Jerzy Banacki (Pollando)
el gazeto „Głos Pracy“*

re cen zoj

AL ABELUJO GI FLUGAS

kolekto de poeziaĵoj de Juhan Liiv, klasikulo de la estona literaturo. Elekto kaj traduko de Hilda Dresen. Enkonduko de d-ro Aarne Vimkel; Redaktis Jüri Talvet; ilustraĵoj de Herold Eelma; prezo 40 kopekoj. Eld. „Eesti Raamat“, Tallin, 1980.

Tragika estas la sorto de la aŭtoro, vivinta 49 jarojn (1864—1913). Li ne aĝis eĉ 30 jarojn, kiam lin trafis nekurablebla psika malsano — skizofrenio. Malgraŭ tio, en momentoj de sereniĝo, li plue kreas. En unu el tiuj momentoj Liiv verkis animskuan versaĵon „Mia poezio“. Liiv skribas: „Ho, mia poezio/ rompiĝis via flugil' /vi kiel vundita birdo/ en kies kor/ — maltrankvil'...“

Simile sonas la versaĵoj „Mi kantis en mallum“ k. a.

Alia malfeliĉo de la poeto estis la sorto de la amata patrolando, kiu en tiu periodo ĝemis sub duobla subpremo: de carismo kaj kapitalismo. Li estis patrioto en la plej bona senco de tiu vorto — li amis sian popolon kaj trasuferis ĝian sorton same kiel propran sorton. Dediĉe al la patrujo Liiv skribis jenajn strofojn: „Mi florligilon prenis/kunligus vin per ĝi,/ kunligus vin malfeliĉan /per floroj, ho Estoni!“

En la libro trovas lokon multaj poezi-juveloj, en kiuj la poeto prikantas la belaĵojn de la estona naturo: „Revenas brutoj post paŝtad/, /aŭdiĝas kant' sen ĉes'/, kaj ĉiu, ĉiu, ĉiu pad' /parolas pri l'junec'!“ („La aŭtuna hejmo“).

Estona naturo estas naturo norda, severa, nebula:
„Arbaro prujna, morta mut“.

Tiun ĉi malgajan naturon Liiv loĝigas per vivo. Liaj pejzaĝoj ofte estas fono, en kiu ni vidas homojn, bestojn, birdojn „falko, lupo aŭ kapreol“


La poemaron „AL ABELUJO GI FLUGAS“ tradukis en Esperanton la vaste konata estona poetino kaj tradukistino Hilda Dresen, kiu senĉese kaj senlace, kun multe da amo prezentas al la internacia legantaro juvelojn de la estona poezio.

La tradukoj de H. Dresen distingiĝas per simpleco, senriproĉa Esperanto-sonado. Talente ŝi interpretas miniaturojn, mallongajn versaĵojn. Guste mallongaj kaj simplaj formoj ja ofte prezentas kaprompan obstaklon por ĉiu tradukisto.

Ne konante la estonan lingvon, mi ne povas esprimi opinion pri la adekvateco de traduko kun originalo. Legante la flue kaj artoplene sonantajn Esperanto-versojn, mi tamen sentas, ke H. Dresen faris sian plejblon ne nur kiel sperta tradukistino, sed, kio estas tre grava, ankaŭ kiel talenta poetino.

Ni dankas al Hilda Dresen, kiu en sia maljuneco ankoraŭ kapablas doni al ni poezian frandaĵon.

As. Grigorov (Sofio)



Cetre, John, ni perdis malkaran, iran teritorion, sed ni akiris ankoraŭ pli malkaran.

ALVOKO AL ĈIUJ SEKCIOJ KAJ AKTIVULOJ DE MEM

Por siaj jam tradiciaj porpacaj ekspozicioj Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, sloganojn, flugfoliojn, albumojn, librojn, revuojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, glumarkojn kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. Laŭdezira rekompenco garantiata!

Bonvolu adresi ĉion al:

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, SU-703000 Samarkando, glavpoŝtamt, p. k. 76, Uzbekistano USSR

Validas ĉiam! Represo en gazetoj kaj nacilingvaj tradukoj petata!

Esperanto-societo „VEKIGO“, P. K. 60, 9700 Sumen — Bulgario honorita per la ora pacmedalo de la Bulg. pacdefenda komitato ĉi aŭtune celebros la 75-an datrevenon de sia fondiĝo. Ni invitas ĉiujn geamikojn sendi salutleterojn kaj korespondpropojn.

Antaŭdankante, ni deziras al vi personan sanon kaj feliĉon kaj multajn sukcesojn en via nobla por- kaj peresperanta, porpaca agado!

Al geedzoj Eva Tófalvi kaj Oldřich Knichal en Budapeŝto (adr. Budaörs, Patko u. 3 II 19) naskiĝis la 9an de majo filo Tomaso. Koran gratulon!

Verketon pri la militarisma politiko de Usono en la sepdekaj jaroj, kies aŭtoro estas estrarano de MEMO. Knichal, ĵus eldonis Ĉeĥoslovaka Packomitato en Prago.

Mi ellaboras multilingvan 1500-vortan fakvortaron pri mikroelektroniko. La vortaro baziĝas sur la plej nova fakliteraturo de 1978 kaj 1979. Estas serĉataj kunlaborantoj el socialismaj landoj. La vortaro estos multlingva-Esperanta.

Richard Partecke, Am Ofenstein, 5, 5900 Eisenach, GDR.

korespondemuloj

Bulgario

F-ino Bistra Dojĉinova, 1233 Sofia, Kavala 42 D, ap. 55—29 jara, pri turismo, BK, turismaj perspektivoj, afiŝoj.

USSR

Junaj entuziasmaj geesperantistoj de ekstremoriento dez. kor. tm. Adreso: 690652 Vladivostok, ul. Ubreviĉa 25, universitato, Esperanto-klubo.

Abramova Tatjana (22 j., flegistino) avenuo „Avtozavodcev“, 16—34, 456304 Miass

Bubenec Nadejda (23 j. ĉeflaboristino), ul. 8 Marta, 173—22, 456 317 Miass.

Bendeŝ Lubov (25 j. laboristino), str. Ilmenskaja 50, 456304 Miass

Buligin Mihail (laboristo) str. Romanenko, 73—56, 456316 Miass.

Jenkova Nadejda (19 j. teknikistino) ul. 8 Marta 165—19, 456317 Miass.

Jigalceva Ljudmila (17 j. studentino), str. Liĥaĉova 21—155, 456319 Miass.

Krasilnikova Natalja (17 j. laboristino) ul. Telmana 54—32, 456305 Miass.

Loseva Janna (17 j. studentino), ul. Siĥaĉova 21—155, 456319 Miass—19.

Malincev Sergej (23 j. laboristo) ul. 8 Marta 151—50, 456317 Miass

Nikolajeva Natalia (25 j. librotenistino), str. Orlovskaja 1—20, 456304 Miass 4,



En la mondo devas regi ordo—
kaj ĝi komenciĝas en Majami!

Nikolaj Entelis

LA VOĈO KAJ EĤO

Mirakla amerika lando! Usono!

Neniu ĝin povas malami! . . .

. . . M a j a m i !

Ja nigran kaj blankan

nur ĝi povas ami. . .

. . . M a j a m i !

Ja ĝi kiel bona patrino

ne traktas ilin malsame. . .

. . . M a j a m i !

Oni devas por rajtoj de l'homo

trans maroj batali. . .

. . . M a j a m i !

Usono! La mielaj paroloj

jam sangfluas malame. . .

. . . M a j a m i ! ! !

Tradukis: K. Istomin

Karaj gesamedianoj,

La revuo "Kolektanto" estas organo de la sekcio de E-kolektantoj.

Ĝi enhavas plej diversspecajn materialojn: lingvajn ekzercojn, intereseajn lecionojn, artikolojn pri hobiaj, versajojn, kanĉojn, esajojn, pruvojn, kromvortajn enigmojn, artikolojn pri belarto, fotado ktp. Kaj estas vidate, la revuo zorgas pri la kolektado kaj kolektantoj - filadelfanoj, filokolektantoj, filaristoj kaj aliaj filofanoj.

En ĝi oni povas trovi adresojn por korespondado kaj interŝanĝo.

Interesa ĉi estas ĝia multaj kluboj.

Multlingvaj kluboj en la revuo estas ĉiuj por la lernado de la lingvo, bonaj helpaĵoj de E-kursgvidantoj.

Ĝin legas en 70 landoj.

La enhavo de la revuo kaj ĝia belartigo estas ĉiam plibonigata.

Aperas kvarfoje dun la jaro.

Jarabono-1,5 levojn.

Por fremlando - 3 levojn, 3 dolarojn aŭ egalvaloran okcidenteŭropan valuton, aŭ per 12 respondkuponoj.

La artikoloj de la revuo estas skribataj de konataj esperantistoj el Bulgario kaj aliaj landoj kaj spertaj kolektantoj.

ADRESO POR ABONO:

Bulgario

Sofio 1000

str. "A. Jdanov" 5.

DSK-konto 185/3081

revuo "Kolektanto"

ADRESO de la redakcio - por leteroj:

Sofio 1303

bul. "Hr. Botev" 97

"Kolektanto"

Por ĉiuj 15 abonoj peranto rajtas unu abonon se npage.

Ni serĉas perantojn!

Ni petas la fracciojn, ke ili anoncu pri la revuo iliajn gesamedianojn.

Ni petas la redaktorojn de Ĝurnaloj kaj revuoj presi notojn pri la revuo.
Anticipajn dankojn!

Redakcio de "KOLEKTANTO"



REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
 Nikola Aleksiev (Bulgario)
 D-ro Detlev Blanke (GDR)
 André Cherpillod (Francio)
 William Gilbert (Francio)
 Oldrich Knichal (ĈSSR)
 Kimiaki Kurita (Japanio)
 Nguyen Hac Trung (Vjetnamio)
 Boleslaw Staszczak (Pollando)
 Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)
 Arta aranĝo: Kiril Draĵev (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuadojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj, aŭ tre klare mane skribitaj *kun interlinia spaco kaj marĝeno*, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan)ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1 v. hod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI Népköztársaság utja 73, Hungario.

Viceprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 USSR

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30, rue Croix Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nan' a, Huruiti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todrov, bul. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario.

Gefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, PK 66, 1404 SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkono CCR — Rouen 102-45 P.)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

KIE ABONI?

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld, 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN. AŭS. 100.

Belgio: Glady Claude, 21 Rue Kessels, 1030 BRUSSEL.

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN11, OPF. £4—

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bul. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA. 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 110 00 PRAHA I 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRN. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN. 20 DM.

Finnlando: Errki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY — CEDEX (pĝk. 771.77R). 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60 108. BERLIN 10 DM.

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona). 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 for.

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakura-gaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp. -Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA, I.

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD.

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6 R/CA-LISBOA 350 eskudo.

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C., ap. 11, R-1900 TIMIȘOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj.

Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304. dol. 6.50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bul. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.